# *Diana Fuentes kaj Eduardo Cabras koncertis en Havano*



Koncerto unika, atendita kaj plena je sonoreco kariba kaj kubaj esencoj, estis prezentita de la kuba kantistino kaj komponistino Diana Fuentes depost du jaroj sen prezentoj en la kubaj scenejoj.
 Promociante sian lastan muzikdiskon Planeta Planetario, sonregistrita kaj licenciita kun la multnacia entrepreno Sony Music, la artistino regalis per ekskluziva karaktero temojn de sia fonogramo, kiu estos lan?ita en Usono la venontan a?guston.
?i prezentis sin en la havana teatro Bertolt Brecht akompanate de eminentaj muzikistoj kaj de sia edzo, Eduardo Cabra, membro de la portorika grupo Calle 13.
Kiel parto de la koncerto ?i honoris la ?usforpasintan gvidanton de la grupo Los Van Van, Juan Formell kaj anka? aliajn artistojn, nome  virinajn vo?ojn tre elstarajn de la kuba kanzonistiko.
?i esprimis sian kontenton esti en Kubo regalante la insulan publikon per iom da muziko el sia nova KD, produktado kiu sendube markas turnopunton en sia kariero.
Mi venis peti la benon de Kubo, de miaj geamikoj kaj danki al ?iuj kiuj helpis min en mia kariero, ?i emfazis. La koncerto plenis je varia enhavo de ?enroj kubaj, konga muziko, folklora, hip-hopo kaj aliaj.
La 11-an de julio Diana Fuentes havos sian unuan fajropruvon en la usona merkato per sia partopreno en la Latin Alternative Music Konference okazonta en la Gramercy Theater de Nov-Jorko.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/cultura/26317-diana-fuentes-kaj-eduardo-cabras-koncertis-en-havano

# Radio Habana Cuba